TEJO-aktuale: numero 291, 2011-11

### SINPREZENTO DE PROGRAMISTO DE PS 2.0-RETEJO

Saluton, karaj!

Mia nomo estas Daniel Bebelacqua, el Urugvajo. Eble kelkaj el vi jam konas min kiel kunrespondeculon pri Radio Aktiva, kaj ekde aprilo/majo de 2010 mi respondecas pri modifoj kaj aldonoj en la retejon de Pasporta Servo. Legu pli: [http://tejo.org/eo/node/1269](http://tejo.org/eo/node/1269)

### PROFILMODIFADO ĈE PASPORTA SERVO REEBLIGITA!

Dum ni solvas la problemon en la servilo, kiu ne permesas modifi la profilon, la retejo estis transpasita al portema servilo.

De nun eblas modifi la propran profilon kiel vi faris antaŭe.

Kiam vi eniros la adreson [http://pasportaservo.org](http://pasportaservo.org) vi rimarkos avertmesaĝon pri redirektado al alia adreso ([http://pasportaservo.danyuy.com](http://pasportaservo.danyuy.com)). Ne zorgu. Tiu estas la adreso de PS en la nova servilo. Se post 5 sekundoj vi ne estos redirektita al tiu adreso, klaku sur la ligilo, kiu aperos en la paĝo.

Se vi spertas iun ajn problemon, ne dubu kontakti nin per la kontakt-formularo aŭ skribu al la retpoŝtadreso: info (ĉe) pasportaservo.org

### [ESPERANTISTOJ] ESPERANTISTOJ EN LA EŬROPA PARLAMENTO

La 8-an de septembro ni, junaj esperantistoj, el pluraj landoj de la mondo alvenis al Bruselo, Belgio. La trajna vojaĝo tien estis sufiĉe longa kaj laciga por la plejmulto de ni, sed tamen indis iri. Sed fakte por kio ni veturis tien?

Tie okazis la duan fojon la Volontula Vilaĝo sur la placo antaŭ la Eŭropa Parlamento. Partoprenis tiun aranĝon delegitoj de eŭropaj junularaj organizoj, inter kies taskoj aperas ankaŭ volontulado/volontuligado. Ankaŭ TEJO estas tia organizo, tial ĝi ne povis manki. Legu pli: [http://www.tejo.org/eo/node/1262](http://www.tejo.org/eo/node/1262)

### APERO ĈE VINILKOSMO DE "DUOPE" DE KAJTO KAJ LA KUBAJ AMINDAJ

Ekde oktobro la diskoj aĉeteblas en la retejo de Vinilkosmo. [http://www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com)

### [ESPERANTISTOJ] ĈU VI KONAS LA MOVADON PRI "FREE HUGS" (SENPAGAJ BRAKUMOJ)?

Temas pri publika aktivado ofertante brakumojn al ĉiu ajn kiu volas, por ke ŝli sentu sin pli bone - sen ajna rekompenco aŭ atendo. Ni starigos tian oferton dum la venonta JES. Devas esti klare ĉu iu partoprenas aŭ ne, pro tio oni foje uzas ŝildon - sed nun pli facilas: portu esperantlingvan ĉemizon aŭ t-ĉemizon kaj homoj ekscios pri la oferto kien ajn vi vagadas. [http://brakumoj.spreadshirt.fr/](http://brakumoj.spreadshirt.fr/)

### [ESPERANTO] SUBTENA KAMPANJO AL VINILKOSMO PER MENDADO DE SAVITAJ DISKOJ

Rigardu kaj aĉetu. Subtenu Vinilkosmon: [http://www.ipernity.com/blog/39007/349653](http://www.ipernity.com/blog/39007/349653) aŭ ĉe [http://www.facebook.com/event.php?eid=185070594900431](http://www.facebook.com/event.php?eid=185070594900431)

## [BAVELETO] RE: (ESPER-GERMAN) 1A ESPERANTISTA MIGRADO AŬTUNA KUN VIDEOFILMO EN LA RETO

(Novaĵoj de GEA)

La 1a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA) arigis 22 partoprenantojn el Svislando, Francujo kaj Germanujo, inter la 2a ĝis la 7a de oktobro 2011 ĉe Rejno. Gaja etoso regis inter la pliaĝuloj, kiuj estis la ĉefa celgrupo de tiu nova aranĝo de Germana Esperanto-Asocio (GEA).

Post sufiĉe streĉa marŝado kaj grimpado, vespere dorlotis la komforta hotelo, kaj ekde la dua tago la kelnero jam fervore lernis Esperanton. La grupo i.a. vizitis la "Kaiserpfalz", fama dogana fortikaĵeto sur Rejn-insulo antaŭ Kaub, kie haveblis dupaĝa gvidilo ankaŭ en Esperanto.

Sur la fama roko Loreley la grupo prezentis la internaci-lingvan version de la samtitola poemo de Heinrich Heine. Oni povas vidi videofilmon sub http://www.youtube.com/watch?v=JdH07MzPJ3A

La ĉeforganizanto Wolfgang Bohr anoncis la 2an EMAn por la venonta jaro, aŭ denove apud Rejno, aŭ apud Mozelo. Maksimuma nombro de partoprenontoj estu 30 por konservi la amikaran etoson.

Informis: Rudolf Fischer

## 28A PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA (PSI), 2A ĜIS 9A DE APRILO EN BONN, GERMANIO

Ni invitas vin de la 2a ĝis la 9a de aprilo 2012 al la 28a Printempa Semajno Internacia (PSI). Ĉifoje ĝi okazos en la klerigejo domo Venusberg en Bonn. Kiel ĉiujare ni planas diversspecan programon kun prelegoj, ekskursoj kaj diversaj kursoj. Infanoj kaj junuloj havas kiel kutime sian propran programon. Kaj kompreneble la paska leporo vizitos nin! Legu pli: http://esperanto.de/psi

## LA ESPERANTA GAZETEJO

Gazetejo.org kunigas informojn pri esperantaj gazetoj. Ĝi ebligas uzantojn ĝui plej diversajn esperantajn gazetojn kaj estas ankaŭ ilo por gazet-redaktistoj kaj verkistoj reklami pri siaj gazetoj kaj profitigi sian gravan kaj laŭdendan laboron al la tuta esperantistaro. Esploru ĝin: http://gazetejo.org

## VENONTAJ RENKONTIĜOJ

[DEJ] PSKK en Belgio, 25a ĝis la 27-a de novembro http://www.fleja.be

Komune festi la Novan Jaron: 10-a Novjara Renkontiĝo kaj 3-a Novjara Internacia Semajno, Bitburg/Germanio, de la 27-a de decembro 2011 ĝis la 3-a de januaro 2012 http://www.esperantoland.org/nr

28-a Internacia Festivalo - en Xanten - internacia etoso - renoma aranĝo - alloga programo, 27.12.2011 ĝis 3.1.2012, Germanio http://www.internacia-festivalo.de

JES: 27a de decembro 2011 ĝis 1a de januaro 2012, Gdansk, Pollando http://jes.pej.pl/

Jarfina Festo+Silvestra Festeno == 27.dec-02.jan.2012 == en franca E-kastelo Greziljono http://gresillon.org/jarfino

2012

NOVA - Novjara Aranĝo de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo) inter la 11-a kaj la 15-a de januaro 2012, Formiga, subŝtato Minas-Ĝerajso, Brazilo http://novjaraaranĝo.wordpress.com

32-a BEJK, Brazila Esperantista Junulara Kongreso, inter la 15-a kaj la 19-a de januaro 2012, Taguatinga, Brazilo http://www.bejo.esperanto.org.br/

70a Regiona Staĝo de Esperanto, 23 / 24 / 25-an de marto 2012, LA PETITE PIERRE, Francio http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr

IJF - Internacia Junulara Festivalo 2012, 4a de aprilo ĝis 10a de aprilo 2012, Cattolica, Italio http://iej.esperanto.it/ijf/2012

Krokodila Renkontiĝo, 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2012, Arrout, suda Francio / Okcitanio http://krokodila2012.wordpress.com/ aŭ krokodila2012 ĉe gmail.com

9-a kongreso de EEU 2012, 16a ĝis 20a de julio 2012, Galivo, Irlando http://eeu-kongreso.webnode.com/

Hanoja UK de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012 http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=413#2

IJK 2012, 5a ĝis 12a de aŭgusto 2012 en Nara, Japanio http://www.tejo.org/ijk

79a Kongreso de Esperanto 18a ĝis 25a de aŭgusto 2012, Mazaradelvalo, Sicilujo, Italujo http://kongreso.esperanto.it/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu